M 1c Paul Gottgetreu, Herrenstr. 12
2284
29. Juli 1931

7-a JARO, N-o 356

LEIPZIG, 30. / 7. 1931

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

# SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA
KULTURA KAJ INTERHELPA ORGANIZO DE PROLET-ESPERANTISTOJ

APERAS SEMAJNE | REDAKTEJO: 14, avenue de Corbéra, Paris 12e. — GVIDANTO: E. Lanti. — SIDEJO DE PLENUM-KOMITATO DE SAT: 23, rue Boyer, Paris 20e. — ADMINISTREJO: R. Lerĥner, Kolmstrasse 1, Leipzig O 27 (Germanio). | APERAS SEMAJNE

## Grava fako de militindustrio: La aviadil-fabrikoj

**La invento de Foker (Fokker) pafi per maŝinpafilo tra la interspacoj de la helico, faligis centojn da milit-aviadistoj**

La financigo de l' flugindustrio, unuatempe akompanata de granda risko, alternis en la komenco inter la fabrikistoj k la registaro, reprezentita de la departementoj de defendo. Speciale tiu rimarko estas trafa por la nederlanda aviadil-konstruisto Foker, kiu jam tre baldaŭ serĉis rilatojn al la diversaj registaroj.

En la jaro 1912 Foker sukcese partoprenis konkurson por milit-aviadiloj en S. Peterburgo (nun: Leningrad) k de tiuj elmontroj datiĝas liaj proponoj al la arme-estraroj en Anglio, Francio, Germanio k Nederlando.

En 1913 oni fondis en Ŝverin (Schwerin), Germanio, malgrandan fabrikon, kiu baldaŭ, "favorita" de la okazintaĵoj de 1914, elkreskis ĝis grandega industricentro.

Se ni rigardas la laboron de Foker dum 1914 ĝis 1918 en Germanio, tiam precipe la strukturo de la D VII-ĉastipo altiras nian atenton, ĉar ĉi tiu maŝino estas ekipita per aparato, kiu ebligas pafi tra la interspacoj de la helicoj; ĝi estis de post 1915 longe la teruro de l' francoj, angloj k belgoj, kiuj ne havis samspecajn maŝinojn.

Dekoj da iliaj aviadistoj komence perdis sian vivon dum tiu malegala batalo. Tiom grandan impreson vekis tiuj perdoj, ke eĉ post la milito la oficialaj francaj vizitantoj evitis dum la flugmaŝin-ekspozicioj en Parizo aliri la lokon, kie estis elmontrataj la Foker-maŝinoj.

Ju pli malproksimiĝas la historia dato de la Versaja packontrakto, des pli klare vidiĝas la militista interveno en tiu branĉo de l' industrio. Aer-maŝinoj por ter- k mar-armeo estas liverataj en diversaj tipoj k por diversaj celoj. Flanke de la holanda fabriko oni, laŭ instigo de la interesita registaro, fondis usonan filion, subfabrikon, kiu post kelkaj jaroj, en 1924, elkreskis ĝis memstara entre-



Belegaj tempoj . . .

preno. Intertempe tie la produktado dank' al speciala komercjura rajtigo efektiviĝis, pro kio fariĝis ebla la konstruado de specialaj maŝintipoj el fremdaj fabrikoj. Kaj tiam malfermiĝis grandaj, tre gravaj perspektivoj. La fondado de filioj fariĝis superflua k nun la Foker-fabrikoj regule ĝuas la profitojn de siaj patentoj el la konvencioj.

Estas mirinde, rilate al la civila aertrafiko k precipe rilate al la militistaraj flugservoj, kiom ege Foker jam trapenetris en ĉiujn landojn! Ni ne hezitas diri, ke ni konsideras Foker kiel negoc-organizanton de la ĉiam pli-fortiĝanta militista aerservo, k liajn fabrikojn kiel unu el la plej danĝeraj militindustrioj de la mondo.

Rigardante la longan liston de la landoj, al kies militaferaj departementoj Foker liveras, ni trovas i. a. Belgion, Hispanion (kiuj uzas grandnombre "Foker C IV"-tipojn), Portugalion, kiu aĉetis en 1924 bombard- k esplor-maŝinojn, Svision, kiu uzas milit-esplormaŝinojn de la Foker-tipoj. Danio estas tre kontenta pri la liveritaj esplormaŝinoj de l' tipo C V, kiuj ankaŭ estas uzataj de la finlanda militista aerservo. Sovetio ne malpli uzas Foker-tipojn, kiel la C I, C IV, D VII, D XI k D XIII.

Kiel ĝenerale estas la animstato de la kliento k liveranto en tiu industrispeco, samkiel en ĉiuj aliaj milit-industrioj, tion pruvas kelkaj sciigoj en la ĵus aperinta vivpriskribo de Foker "La fluganta holandano" (De Vliegende Hollander). Interalie oni mencias en ĝi anglan proponon de 25 milionoj da guldenoj por instigi Foker, ke li interŝanĝu sian laboron por Germanio kontraŭ tiu por Anglio. Ĉi tiu propono pro la cenzuro neniam atingis Foker, pro kio ĝi ne povis esti akceptata. En la alia kazo la propono verŝajne estus malaperinta en la sekretan arkivon de Foker. Ne malpli grava estas la komuniko, ke post la batalhalto oni, per subaĉeto de doganistoj, povis kontrabande enirigi en Holando 6 vagonarojn ŝarĝitajn per aermaŝinoj k maŝinpartoj, por tiel escepti senrajte tiun ĉi materialon de la konvencio, kiu ordonis, ke ĉio estu neniigota. Jen fakto!

En la lando de Musolini Foker ĝuas eksterordinaran intereson. La "Duce" akiris la rajton fabriki kelkajn maŝintipojn, i. a. ankaŭ por la konata strategia esplortipo (dupersona), C V, kiu nun en grandaj kvantoj rapidege estas konstruata en la fabrikoj de Ernesto

M 1e Paul Gottgetreu, Hannover 12

Breda en Milano. Polio elektis kiel ĉasmaŝinon por la armeo la Foker-tipon.

Ankaŭ Anglio uzas Foker-maŝinojn, kiuj estas konstruataj de la "Armstrong Siddeley Development"-Kompanio. Dum Rumanio jam uzas maŝinojn el la Foker-fabrikoj, Francio post la plej freŝdataj aerakcidentoj ankaŭ frapis al la Foker-pordo por la liverado de militaj aermaŝinoj.

Bolivio, Honduraso, Nikaragvo estas tre kontentaj klientoj. Argentino k Kubo aĉetas samcele Fokeran materialon, dum la usona flugkorpuso disponas pri specimenkarto de aerflugmaŝinoj, kiuj estas konstruataj en 4 fabrikoj.

Intertempe oni fondis franc-svisan grupon, kiu aĉetis la konstrurajton por Francio, por praktike uzi ĝin en Balkano, Suda Ameriko, Turkio k Egiptio. Ne estas nur la bonaj ecoj en flugado de la Fokeraj maŝinoj, kiuj kaŭzis ilian tiel grandskalan disvastigon, sed ankaŭ ilia milita ekipo estas unu el iliaj avantaĝoj. Ni jam menciis la aparaton, kiu ebligas pafi per du maŝinpafiloj rekte antaŭen tra la interspacoj de la helico. Pli k pli tamen la bombardmaŝino ludas distingan rolon. Memkompreneble la Foker-konstruistoj donas atenton al tiu demando. La esplormaŝino C V jam povas esti uzata por tiu celo, k tial estas muntitaj sub la subflugilo kelkaj bombobretoj. Por plenumi specialajn bombardojn, estas liverataj apartaj maŝinoj el la civila trafikservo. Tiel ekz. la F VIII povas transporti 2 pilotojn k 15 pasaĝerojn, aŭ kiel granda bombĵetulo 2 pilotojn, 2 helpantojn k 800 kilogramojn da bomboj.

Tiel oni vidas, ke la civilaj trafik- k la bombard-maŝinoj estas nur variaĵoj de samspecaj tipoj.

La fakto, ke la Foker-fabrikistoj kiel komercistoj neniam malatentis la militan ekipon, vidiĝas el parto de la de Foker aperigita "Bulteno", en kiu li diras: "Volonte ni donas pliajn informojn pri la speciala meĥanika maŝinpafil-instalo. La samo ankaŭ valoras por la aliaj armil-instaloj, ekz. la instrumento por funkciigi plankomaŝinpafilon, bombobretoj kun plena meĥanika ĵetinstalo kun aŭ sen elektra kontrolaparato ktp.

"Estas nia specialaĵo tiuj ĉi meĥanikaj bomboĵet-instaloj. Niaj instaloj por malforta bombardo kun pendigo sub la flugiloj, samkiel por forta bombardo kun pendigo de la bomboj en la trunko, kiuj ne kaŭzas rezistpliigon, estas ellaboritaj por plena kontentigo de niaj klientoj."

Malarmado? Ne! Perfektigo de l' militindustrioj, invento k efektivigo de pli efikaj, pli subtilaj detruiloj — jen, kio karakterizas nian epokon. Estas Foker k siaspeculoj, kies entreprenoj plej bone prosperas k floras, ne tiom pro la ĝenerala progreso de l' aerveturado, kiom pro la konstantaj mendoj por evidentaj militaj celoj.

*Kompilis A. E. 15 700).*

ĴUS APERIS:
24-paĝa kajero por julio/aŭgusto de
LA NOVA EPOKO

kun **ekskluzive originala** prolet-esperantista **literaturo** el Sovetio, Sudafriko, Bulgario ktp.

Ĉiu havigu al si tiun unikan kajeron, por pliriĉigi sian bibliotekon per aro da interesaj k belaj literaturaĵoj.


Rapidu mendi tiun ĉi n-on por **0,50 mk.g.** Ni ofertas al vi tiun ĉi k la antaŭe aperintan duoblan kajeron kun primilita literaturo **kune** por la prezo de **0,80 mk. g.**

**Administrejo de SAT, Colmstrasse 1 Leipzig O 27.**

# Rakontas SAT-anoj, kiuj travivis la militon...

## Tagoj el mia vivo

La proleta vivo pasas unutone, similas unu tago la alian; kiel la nuboj preteriras la okazaĵoj; iom da ĝojo trafas nin, sed hajlo k pluvo ne malestas. Por bonhava klaso ni perlaboras la komforton, bonpoziciaj uloj



ne kontentiĝas pri tio; ili, por amuzi sin, igas nin danci laŭ kaprica fluto. Nekonsciulo sekvas tiajn aranĝojn kiel ŝafo la buĉiston. Nur generacioj da homoj povas sinsekve kleriĝadi, eron k eron alportante por nova, pli bona, racia ordo. Ĝis la amaso krevigas la katenon de superstiĉo, de humilo, de religio. Antaŭ nia vivzenito floras ankoraŭ la espero, poste, por trompitoj, komenciĝas la malsupreniro.

En jaro 1914 mi laboris kiel lignaĵist-helpanto en Festenburg (Silezio). De matena krepusko ĝis la 19-a vespere laborante mi akiris semajne 14 markojn. Por modesta vivbezono tio tute sufiĉis, ĉirkaŭa arbaro allogis por pasigi la libertempon en bela naturo; dum pluvado ni ludis skaton (kartludon). Atendita letero de militesplorkomisiono ekĝenis mian trankvilan idilion. Tiu komisiono elserĉis la plej sanajn, vivoĝojajn junulojn. Ili trovis min taŭga. Iam mia patro instruis min, ke soldatservo malhonorigas homon. Sed kontraŭstaro estus kvazaŭ memmortigo. Burĝaj figazetoj serĉis tiam en apudlimaj provincoj per lupeoj iun kaŭzon por ekmiliti. La atmosfero estis graveda de ŝovinismo k kalumnioj.

En majo mi skribis al iama majstro en Greene (Brunsvigo), kies afablo k sincero restis en mia memoro. "Mi tre urĝe bezonas vin, venu plej rapide, ĉar mendoj tre ŝarĝas min," estis lia tuja respondo. Laborkondiĉoj k salajro estis tre bonaj k la montaro Harc ebligis agrablan promenadon. Sed al vampiro denove ne plaĉis mia sorto. Dum 24 horoj freneziĝis la tuta lando. Antaŭ poŝtejo aperis telegramo: Milito estas deklarita, prenu la armilojn por defendi la patrion. Gimnastikuloj kun muzikistoj tramarŝis la vilaĝon, blovis per trumpetoj alarmon, rezervsoldatoj veturis en kazernojn. Kiel trafite de fulmo mi kaŝis min en ĉambreto k ploregis, ploregis.

Preter la laborejaj fenestroj transportis trajno post trajno hombuĉistojn, armilojn, mortigilojn. Dum noktoj oni baris la stratojn por ekhaltigi la famajn or-transport-aŭtojn de Francio al Rusio. Pafiloj estis disdonataj por gardi pontojn k tunelojn. Iu komizvojaĝanto vendis en la vilaĝo kribriletojn por kribri el kranoj fluantan akvon. La diablo enflustris al la homoj, ke la kribriloj estas bacilinfektitaj, ke la vendinto estas anglo. Lin oni ne povis kapti, sed la instrumentojn oni senescepte forĵetis. La 9-an de oktobro min atingis telegramo, por ke mi eksoldatiĝu. Majstro plenigis mian kofron per kolbasoj k cigaroj. Adiaŭ!

En Oels komenciĝis plej gravaj studadoj: briligi butonojn k zorge saluti la superulojn. En la kvara tago mi ricevis pafilon k la 12-an tagon jam soldatbotojn k pantalonon. La vestaĵ-suboficiro donis al mi difektitajn botojn: "Miaj botoj baldaŭ ruiniĝos, donu al mi novajn!" mi plendis.

"Vi pli frue kadavriĝos ol la botoj," respondis li, k li pravis, *parte*. La 16-an de decembro ni ekveturis en porbesta vagono okcidenten. En grandaj urboj oni disdonis frandaĵojn, cigarojn. Post la limo la loĝantoj ne plu estis donemaj. Nur en Sedan okazis nutrado per rizo. Ni miris, de kie oni ricevis tiom da rizo.

Finstacio estis Ŝatel (Chatel). Ĉi tie eĉ mankis akvo. En preĝejo ĝemis

vunditoj. En tombejo kuŝis 8 kadavroj. Vespere ni denove vizitis kadavrojn. Estis tri. "Diru al mi, sanitaristo, ĉu la 5 reviviĝis?"

"Ne, 25 oni komune enterigis, la trio restas, ĝis denove sumiĝos 25." — Ni translokiĝis en rezervan pozicion. Kiel talpoj ni fosis truon subteran, kugloj fajfis, grenadoj eksplodis. Ni partigis la laboron (duope ni loĝis en truo); unu alportis akvon, la alia serĉis betulan lignon en Argon-arbaro. La 31-an de decembro mi ĵus estis alportinta lignon, kiam subite en ŝtonrompejo, de kie mia kamarado Ŝmit alportis la akvon, kelkaj grenadoj eksplodis. Duonan horon poste mi serĉis amikon Ŝmit; li estis dispecetigita de la grenadoj. Kun helpo de aliaj ni kolektis la pecojn de Ŝmit k ĵetis ilin en tombon. Tiel finiĝis por mi la jaro 1914.

*Alb. Fluder (10 746).*

## Eksterordinara tago el mia vivo

Legante en gazetoj pri agoj de reakciuloj per soldatoj kontraŭ strikantaj laboristoj, mi ĉiam devas pensi pri eksterordinara tago el mia vivo. Estis dum la malbenita hombuĉado en aprilo 1918 en Francio. Mi estis militkaptito en franca kaptitejo ĉe kompanio 15-a. En ĉi lasta suferis 420 homoj pro fanatikaj ĉikanoj precipe de oficiroj, kiuj distingis sin per tio, same kiel multaj germanaj. La principo de l' estro-oficiro estis ricevi kiel eble plej multe da laboro el ni militkaptitoj. Sed aliparte li ne volis doni al ni la nutraĵon necesan por elteni la penigan laboron.

Unue mi mallonge volas rakonti pri la ordinara tago de iama militkaptito. Frumatene je la kvina estis vekiĝo k kaftrinko (la panporcio jam estis manĝita antaŭan vesperon tuj post la distribuo, ĉar ni ĉiam havis grandan malsaton). Duonan horon poste okazis la kontrolo, eldono de fosiloj k hakiloj k ekmarŝo al laborejo. Ĝis la 12-a ni laboregis kun paŭzo de duona horo je la naŭa. De la 12-a ĝis 13-a estis tagmanĝa paŭzo. Ni manĝis nian malgrasan akvosupon, en kiu kutime troviĝis rizo, terpomoj aŭ faboj, sed bedaŭrinde en malsufiĉa kvanto. Foje mi nombris la fabojn en mia supo k estis akurate 27 da ili... Posttagmeze daŭris la laboro ĝis la 18-a, tiam ni remarŝis al tendaro, kie ni denove ricevis nian supon. Post la ricevo de pano k post la kontrolo la militkaptito kuŝigis sin sur la dormejon k ekdormis baldaŭ pro tro granda laco. Tiel pasis unu tago post la alia, nur la dimanĉo, depost aŭtuno 1917, estis ripoztago. En tiu tago ni ricevis sendaĵojn alvenintajn el Germanio. En tiu tago ni dormis, ludis karton aŭ ŝakon aŭ rakontis pri belaj tagoj ktp.

Nun la eksterordinara tago! Dum aprilo 1918 ni troviĝis en granda tendaro en Kampanio (Champagne). Nia laboro estis elfosi teron por aranĝo de novaj relvojoj por milita celo. Ĉar ĉi tio estis tre urĝa, la oficiroj surŝarĝis nin per multege da laboro. Oni kvazaŭ eltiris el ni la lastajn fortojn. Ni parolis kun la oficiroj pri nia nutraĵo, ke ni ne povas elteni tian laboron sen sufiĉa manĝaĵo; ni petis ne nur unufoje, sed vane —, ĉiam la konsolo de unu tago al alia. En tiuj tagoj ni ofte priparolis, ĉu estus taŭge, se ni strikus. Ni diris al ni, ke ni ne povus perdi ion, se ni tiel agus. Kaj unu vesperon, ĉe la ricevo de la malgrasa supo post peniga laboro dum la tago, ni sentis, ke la situacio por ni estis senespera k ni decidis striki. Alian matenon post la vekiĝo dum la kontrolo nia ĉefserĝento por ni deklaris al kontrolanta kaporalo franca, ke la kompanio ne plu volas labori, ĝis ĝi ricevos pli bonan k sufiĉan manĝaĵon.

Venis la oficiroj k ordonis eniri la kabanojn, kiujn oni poste ŝlosis. Ni jam instalis nin por restado de kelkaj tagoj. Post kelkaj minutoj venis interpretisto k ordonis, ke volontuloj eliru: la aliaj ne pli frue ricevus manĝaĵon, ĝis ili libervole rekomencus la laboron. Elpaŝis unu strikrompanto — estis kompania tajloro —, la aliaj ridetis k restis en la kabano.

Du horojn poste venis oficiro k ordonis eliri por kontrolo. Elirante ni vidis soldatojn, ŝarĝantaj pafilojn, malantaŭ la dratbarilo staris kompanio da soldatoj kun maŝinpafiloj direktitaj kontraŭ ni. Sume estis pli ol cent soldatoj armitaj kontraŭ 420 senhelpaj homoj malsataj. La franca interpretisto laŭ ordono de kapitano laŭtlegis la militleĝaron, ke rifuzanto de ordono estas punota per tuja morto. Poste la kapitano ordonis: "Maldekstren ekmarŝu!" Sed neniu obeis. Ĉiuj restis senmovaj. "Bone", diris la kapitano, eltiris revolveron, iris al la unua kamarado, metis la armilon sur lian bruston k ree ordonis, ke li ekmarŝu. Nun estis kompreneble, ke li obeis, ĉar li ja riskis la vivon. La kapitano bone komprenis, ke li ne povus mortigi 420 homojn, sed unu homon li malvarmsange estus mortiginta, ĉar tiam li povis diri, ke la militkaptito ne obeis rektan ordonon. Ni aliaj sekvis k kun duhora malfruiĝo ni atingis la laborejon.

Tio estas nun priskribo de striko rimarkinda kontraŭ militistaro, kiu kompreneble malsukcesis, ĉar nin kontraŭstaris armitaj homoj. Ni provis alian rimedon, la tielnomatan pasivan reziston, k sukcesis. Ni laboris tiel malrapide, ke la kapitano preskaŭ eksplodis pro furiozo. Post du tagoj la nutraĵo estis pli bona k iomete sufiĉa.

Du monatojn poste 4 serĝentoj germanaj el nia kompanio estis kondamnitaj je du- ĝis ok-jara punlaboro.

*R. Weiner (10 564).*

## MILITON AL MILIT'!

*Ĥ. M. ĤRIMA*

*Ankoraŭ prem-inkubas rememoroj*
*pri l' kruelega granda mond-milit',*
*kaŭzita de la regnaj grand-sinjoroj,*
*al Mort' oferis kiuj sen hezit'*
*sennombrajn homojn de l' malsupraj*
*klasoj*
*el ĉiuj landoj k el ĉiuj rasoj.*

*Ankoraŭ vundoj ne sin aglutinas*
*de la viktimoj de ĉi monstra far';*
*mizer' ankoraŭ regas pli senlima*
*en rondo vasta de la proletar';*
*ankor' patrinoj k edzinoj larmas,*
*kaj landregantoj sin intense armas!*

*Gigantaj ŝipoj estas konstruataj*
*k ekipataj por servad' al Mort'.*
*Multiĝas ankaŭ la submar-boatoj.*
*Kadavrojn rampos ĉasi tanka hord'.*
*Aviadiloj flugos, en interno*
*kun gas' venena, por homar-ekstermo!*

*Instruas landregantoj nin pariojn,*
*ke naskolandon sole amu ni;*
*ke ni defendu per la viv' patrion,*
*ĉar ĝi riĉigas ĉiam ilin pli!*
*Sed jam brilegas Nova Ruĝa Kredo:*
*patri' paria estas Ter'-planedo!*

*Magnatoj! scias vi, ke l' Kredo Nova*
*minacas stampfi vin de l' ora tron';*
*ke ĝia ruĝa brilo estas pova:*
*sub ĝi fandiĝos tanko k kanon'!*
*Pro tio — per milita aventuro*
*vi provos savi vin de ĉi teruro!*

*Per artikoloj trompaj, hipokritaj*
*instigas burĝoj fraton kontraŭ frat'.*
*Kun kruc' en mano pastroj dibenitaj*
*predikas pie per fiparolad':*
*"Ho, saĝe estas morti por Patrio . . .*
*Kuraĝe! Staras niaflanke Dio!"*

*Sed, samklasanoj, ĉu ni nin atakos?*
*Ĉu ni estiĝos nutro por la Mort'?*
*Ne! Ne! La Ruĝa Kredo nin enbrakos!*
*Muskolojn streĉos ni per tuta fort':*
*Ne formos ree ni batalajn frontojn,*
*sed fraz' lumigos fulme valojn,*
*montojn:*
*MILITON AL MILIT'!*

HENRI BARBUSSE

**Eklumo en la abismo**

Kun antaŭparolo de la aŭtoro al la esperanta eldono.

Sub la freŝaj impresoj de la mondmilito la fama aŭtoro verkis tiun ĉi plaĉe prezentitan 96-paĝan verketon. Forta protesto kontraŭ la milito, esploro de ĝiaj radikoj kaj pasia kulpigo al la kapitalista sistemo! - Ni rekomendas la libron varme al ĉiuj K-doj, kiuj iom perfektiĝis en nia lingvo kaj volas ĝui meditigan legaĵon.

**Havebla ĉe Administr. de SAT**

PREZO: **0,80** mk. g.

# LA ORATORO

*La 31-an de julio 1914, en la horoj de angoro, kiam la homaro en sinforgesa frenezo ĵetis sin en la militegon, kiel oni scias, Johano Ĵores (Jean Jaurès) estis fimortigata de ŝovinisto. Memore al lia nobla figuro sekvu ĉi tiu impresa ĉapitro. — Red.*

Ĵores estas sur la tribuno.

Ĉirkaŭ li, dekstre, maldekstre, antaŭe, malantaŭe, miloj da kapoj, da vizaĝoj streĉitaj en la atento, varmigitaj de l' entuziasmo k kiuj ekheliĝas por momentoj, per rideto de diskreta aprobo, okuloj, kiuj eklumas, lipoj, kiuj duonmalfermiĝas en cirkumfleksa akcento... Tio estas la intelekta manĝo de l' dupieduloj... Kun larĝa gesto, rigardo perdita al oni ne scias kiu nevidebla stelo, Ĵores, impone bela, noble granda, eksterordinarega, regas la spiregantan amason...

Nenia murmuro. Nenia flustrado. Oni ne riskas plu purigi sian nazon. Oni retenas perforte en la fundo de l' gorĝo la persistegan tuson. Ses mil individuoj, amasigitaj en la malbonodoro de la elspiroj intermiksitaj k kunfanditaj kun la sufokado de l' tabako, estas tie, kun streĉita kolo, ŝvelintaj tempioj, malsekega frunto. Oni aŭdas la bruon, kiun faras la malfacile spirantaj brustoj... Super tiu ĉi arego, Ĵores, plej elokventa, sublima, majestega!...

Ĉio estas trankvila. La homa maro ondiĝas facile sub la venteto de l' paroloj. Sed, subite, jen la nordvento. La ekblovego subitas. La uragano senbridiĝas. La voĉo de l' popol-oratoro ŝvelas, plifortiĝas, plenigas la salonon, elverŝiĝas en la straton kun bruego de tondro. Frostotremo skuas la aŭskultantaron. Vortoj ekflagras kiel fulmoj. Vortoj eksplodas kiel grenadoj. La infera uragano senradikigas la volojn, teren ĵetas la malfidojn, frakasas la ribelojn. Kaj, kiam Ĵores finis, kiam, lia frazotutaĵo trafe ĵetita, li viŝas la ŝviton k reprenas spiron, ses mil personoj, starante, piedfrapadas, manklakadas, hurlas pro ĝojo, kiel tordiĝantaj kune en epilepsia atako. La salono ŝanceliĝas sub la aplaŭdoj. Grandega kriado leviĝas, invadas ĉion.

Sed Ĵores komencas perdi la memregon. Kiel la Sibilo, kiu ŝaŭmis k ruliĝis tere antaŭ ol profeti, li ŝajnas turmentata de la oratora febro. Li komandis ĵus antaŭ momento al siaj aŭskultantoj, tenis ilin sub sia rigardo k direktis ilin laŭ sia plaĉo. Nun, estas la aŭskultantaro, kiu tenas lin, k li suferas ĝian influon. La fluo, kiun li estigis, refluas al li. Li ne plu vidas klare. Li perdas la percepton pri la aferoj. Kaj, la pugnojn en la aero, kuntiriĝinta kvazaŭ li estus eksaltegonta, simila al atleto, kiu levas pezilojn, Ĵores naskas la plej pezajn metaforojn, ĵonglas per la bildoj, amasigas la alegoriojn, multobligas la antitezojn, dum la amaso, en angoro, atendas kun ektimego, ke la akrobataĵo estu plenumita.

Kaj tio fariĝas tute simple mireginda. Oni vidas Ĵoreson sin ekĵeti al la nuboj kun la facilo de serafo, por malsuprenfali subite ĝis la fundo de l' oceanoj. Jen li fortrenas nin al la belbrilego de l' poluso. Oni devas lin sekvi. Baldaŭ ni komencas esplori la pasinton k malkovri la estonton. Kun kapturniga rapido ni ekprovas la supreniron al la senmakulaj montoj por remalsupreniĝi poste al la abismoj, kie blekas la Leviatano. Ni trapasos oazojn de lumo, arbarojn de nescio, dezertojn de l' penso; ni vidos brili, en la malproksimo, la lumturon de l' progreso, superŝutitan por momentoj, sub la dikaj nuboj de l' mensogo k de l' eraro. Poste, kiel brilega suno, la socia Revolucio ekaperos, foje trankvila, majesta, paca; foje ruliĝanta inter ruĝaj riveregoj, eklumoj de brulego k brukriado. Malantaŭe, malfermetiĝas iome la pordoj de l' nova k ĉiam estonta paradizo, la feliĉega socio de morgaŭ, kie ni havos kiom la koro deziras, kie la homoj estos dolĉaj kiel ŝafidoj. Ĉar ĝenerale finiĝas la uragano en ekstazo. La gesto de l' oratoro fariĝas pli vasta, la voĉo fariĝas pie milda. La sereno etendiĝas sur la vizaĝoj k la Socialismo triumfanta instaliĝas sur la ruinoj de la Malnova Mondo.

Kaj kiam oni eliras de tie, ĉe la sonoj de l' *Internacio*, krie kantata el ses mil brustoj, kiam oni sin trovas en la strato, sub la malĝentilegaĵoj k la minacoj de l' policistaĉoj, oni ŝancelpaŝas, oni estas ebria kvazaŭ oni estus trinkinta absintaĵon. Oni foriras, kun malplena kapo, mankanta penso, kun bruo en la cerbo, la ĵus pasintan ventegon en la kranio. Oni nenion konservis el tio, kio estas dirita. Oni ne plu memoras. Oni revidas sole, en nebulo, la supermezure grandigitan silueton de Ĵores, levanta siajn pugnojn al la ĉielo, simila al tiuj gigantaj diaĵoj de l' montoj, kiuj, per unu spirblovo, balancfaligas la lavangojn.

El la franclingva verko:
*Kulisoj k fiaktoriĝoj* de V. Merik (Méric)
trad. *Puer.*

## Civilizo k barbareco

— Paĉjo, kio do diferencigas la civilizon de la barbareco?

— Ho, la afero estas ja simpla: Civilizo, t. e. mortigi sian malamikon en distanco de ses mil metroj per kanonkuglego. Kaj la barbareco, t. e. tranĉi al li la kapon per glavo.

# LA KLASBATALO TRA LA MONDO

**La grandlokaŭto en Norvegio**

En ĉiuj kapitalistaj landoj regas ekonomia krizo. La nuna sociordo estas mortkondamnita k la internacia kapitalistaro uzas ĉiujn rimedojn por savi sian sistemon k kontraŭbatali la pli k pli kreskantan laboristan movadon.

En Norvegio kiel en aliaj landoj, la klasbatalo pliakriĝas de tago al tago. De mezo de aprilo la norvega kapitalistaro laŭ interskandinavia kapitalista plano lokaŭtigis proks. 90 mil gelaboristojn el preskaŭ ĉiuj plej gravaj metioj k industrioj. Antaŭ la lokaŭto ambaŭ partoj, kapitalistaj k laboristaj reprezentantoj, laŭleĝe estis devigataj fari intertraktadon kun la ŝtata interpacigisto, sed sen iu ajn rezulto, ĉar la kapitalistoj estis tro postulemaj k batalemaj; sub preteksto, ke la norvega laboristaro ricevas la plej altajn salajrojn, kompare kun ajna lando en la tuta mondo, sekve de kio al ili estas neeble fari efektivan konkuron sur la mondmerkato. Pro tio ili postulis malplialtigon de l' salajroj de 12 ĝis 40% k multajn aliajn malplibonigojn de la laboristara vivstato.

Siaflanke la laboristoj tuj deklaris, ke ili ne povas akcepti iujn ajn salajrmalplialtigojn k postulis 7-horan labortagon, 14 tagojn da ferioj, plibonigon de metilernantaj kondiĉoj ktp. La kapitalistoj rifuzis intertrakti pri iu ajn plibonigo k de tiam komenciĝis la plej granda lukto inter laboristoj k mastroj ĝis nun vidita en Norvegio. La 23-an de majo la ŝtata interpacigisto, post longa intertraktado kun la partioj, ellaboris pacproponon, enhavanta 8%-an salajr-malaltigon. Kaj la lokaŭtitoj k la kapitalistoj rifuzis tiun ĉi proponon. La 13-an de julio oni denove komencis traktadi kun la ŝtata interpacigisto. Pri la rezulto oni nenion povas antaŭdiri.

Dum la tuta konflikto, la lab. gvidantaro nur uzis la t. n. pasivan taktikon, t. e. ili ne volis akrigi la lukton per simpatistrikoj, efektivaj blokadoj ktp. La sindikata opozicio akre kritikas tiun taktikon, kiu laŭ ĝia opinio nur kondukas al malvenko. Rimarkinde estas, ke ĉie, kie la opoziciuloj estas plimulto, ili akre batalas k malkuraĝigas la mastrojn, dum aliloke, kie la gvidantoj regas, oni nur raportas pri malvenko, strikrompantoj k indiferento. Plurloke, dum la lokaŭto, okazis

interpuŝiĝo inter la lokaŭtitoj k policistoj kaŭze de strikrompantoj. Ĉe *Menstad*, ĥemiaj fabrikoj k haveno, apartenanta al "Norsk Hydro", filiasocio de mondfama germana "Farbindustrio", okazis vera milito. La lokaŭtitoj tie bastonadis la policistojn, kiuj gardis strikrompantojn, k forpelis ĉi lastajn. "Norsk Hydro" petis helpon de la registaro, kiu tuj sendis 4 militŝipojn, 2 batalionojn da soldatoj k 100 policistojn al la loko, bone armitaj per maŝinpafiloj, larmgaso ktp. Sed la loĝantaro pasive kontraŭbatalis tiujn ulojn. Ili eĉ ne povis lui ĉambrojn aŭ aĉeti al si la necesajn nutraĵojn. Kiam ili aperis sur la strato, ili tuj estis ĉirkaŭitaj de la geinfanoj, kiuj kantis la *Internacion*. Post kelkaj semajnoj, la soldatoj k policistoj malaperis laŭ registara ordono. —

Kian gravan influon la lokaŭto havas por la norvega nacia ekonomio, oni vidas, kiam oni rigardas la import- k eksport-statistikon. Ĝi montras grandegan subreston en la komerca bilanco. Dum majo 1931 la tuta importo estis 71,3 milionoj da kronoj k la eksporto 23,9 milionoj. Do, importpliaĵo de 47,3 milionoj da kr. Kompare kun pasintjara majo estis tiam: importo de 96,9 milionoj da kr., eksporto de 57,3 mil., do import-pliaĵo de 39,6 milionoj. Tiuj nombroj bone montras, kio okazas, kiam miloj da laboruloj estas senokupaj.

Dank' al granda oferemo de eksterlanda laboristaro per monhelpo k morala subteno la norvega lokaŭtitaro povas daŭrigi sian lukton. Kun ĝojo oni povas vidi, ke ankaŭ la proletesperantistoj estas atentemaj pri nia batalo k helpas nin (la Alĝera lab. esp. grupo. Dankon). Ne troviĝas multaj prol. esp-istoj en Norvegio, sed ĉiu el ili havas sian lokon en la organizita laboristaro plenumante sian devon laŭpove. Ĉiu estas konvinkita atingi la celon: Detruo al la kapitalismo, venko al la socialismo. *A. Magnusson (16 444).*

---

### El Ĉeĥoslovakio

En Pardubice okazis ekspozicio, kies protektanto, ŝtatprezidanto Masarik, parolis jenon: "Pardubice, mi scias, havas sian sportan tradicion. Vi havas tie la tombon de unu el la unuaj flugpilotoj. Sekvu vi en tiu ĉi tradicio..." (ĉu tio signifas, ke ni mortfalu ĉiuj?) "k estu vi viva ekzemplo al via proksimulo, ĉirkaŭaĵo k ceteraj urboj de l' respubliko."

En la sama ekspozicio troviĝis ankaŭ sekvanta surskribo: "Ĉe ni oni konsumas tro malmulte da sukero kompare al la aliaj ŝtatoj. Ankoraŭ ni devas lerni manĝi sukeron." — Tion diras nia ŝtatprezidanto, dum en nia sukeroriĉa ŝtato 1 kg da sukero kostas pli ol 6 kr. ĉeĥajn (ĉ. 20 usonajn cendojn) dum eksterlanden oni vendas la kilogramon por 0,80 kr. ĉ.

*Laŭ "Tvarba" trad. Lachnit-Svinov.*

---

### El Bulgario

Por rompi la plifortiĝantan kontraŭstaron de l' laborista k kamparana loĝantaro al la faŝista reĝimo (la grado de tiu kontraŭstaro montriĝis en la rezulto de l' parlament-elektoj), la registaro preparas novan subpremagadon, minacante nuligi la mandatojn de la laborist-partiaj (komunistaj) deputitoj k fermante en multaj lokoj la filiojn k sekciojn de la laborist-kamparana partio. *N. V.*

---

## MI VOLAS SCII...

Ĉar SAT estas kultura organizo, ĝi povus informi siajn membrojn ankaŭ pri aferoj de l' ĉiutaga vivo, kiel aĉetado de nutraĵoj ktp., por malhelpi, ke proletoj malŝpare elspezu sian ŝvite perlaboritan monon por senvaloraj varoj, kiun ili pli bone povas uzi por klasbatalaj celoj.

En Germanio, Aŭstrio k aliaj landoj nun estas propagandata brazila teo "Mate", kiu laŭaserte anstataŭas ĉian legoman nutradon. Oni diras, ke la regula trinkado de tiu teo estas tre saniga, kion pruvas ĝia disvastigo tra tuta Sudameriko. Kompreneble simpla laboristo ne povas diferencigi inter vero k propaganda trompo. Tial mi proponas, ke niaj braziliaj SAT-anoj klarigu en "S-ulo" valoron de tiu teo.

*Teamiko.*

---

### Respondo al K-do F. S. (16 462) en n-o 351

Ĉie en la kapitalista mondo okazas similaj konfliktoj inter la laboristaro k la kapitalista socio. Estas bone komprenebla la sinteno de la Vienaj tramistoj, se ili ne emas suferi la sekvojn de la kapitalista krizo, kiun ja ne kulpas la tramistoj k la laboristaro ĝenerale, sed la kapitalistaro mem. La revolucia laboristaro tute ne havas intereson pri "demokratigo" de la mizero per voĉdonigo pri la mizerigo, kiel aranĝis la Viena tramdirekcio. La revolucia laboristaro ja ne volas esti kuracisto de la malsana kapitalismo, sed ĝi volas esti la entombigisto.

La dilemo, en kiu troviĝas la socialdemokrata tramdirekcio en Vieno, estas tute la sama, kiel en ĉiuj okazoj, en kiuj socialdemokratoj plenumas la aferojn de la kapitalisma socio. Estus mencieblaj mil faktoj el la politika vivo en Germanio ekzemple, ke socialdemokratoj devas plenumi, vole aŭ nevole, la direktivojn de la kapitalistaj ordonantoj. Kaj tio estas la sola servo, kiun ankoraŭ povas fari la socialdemokrata partio en la kapitalista sistemo: ludi la rolon, kiun senkaŝaj reprezentantoj de la kapitalismo ne povus ludi, nome trankviligi per belaj vortoj pri demokrateco la laboristaron.

Estas kompreneble, ke per tiu porkapitalisma agado de la socialdemokratia partio malfermiĝas la okuloj de la laboristaro, kiu ekkonas la trompon de la burĝaro, kiu lerte toleras socialdemokratan administradon, se ĝi ne kontraŭas la kapitalistajn interesojn. Estas evidente, ke la burĝaro facile povus forigi la socialdem. administradon en Vieno k ankaŭ la soc. dem. policprezidantojn k ministrojn en Germanio, se ĝi trovus tion utila por sia regado. Ĝi bone komprenas, ke la forigo de la socialdemokratoj puŝus la laboristaron en la revolucian fronton.

La sola vojo por la Vienaj K-doj estas lasi la socialdemokratan urban k tramvojan estraron administradi en sia dilemo k energie per revoluciaj metodoj detrui la tutan kapitalisman sistemon inkluzive la porkapitalista servantaro k helpantaro.

*348 (Hbg.)*

---

### Ĉu ankoraŭ kapitalismo?

Kun intereso mi legis la artikolon de K-do 16 462 en "S-ulo" n-o 352. En ĝi li riproĉas al la burĝa ŝtato, ke ĝi per ĉiaj rimedoj klopodas daŭrigi la kapitalisman sistemon. Kial? Estas ja ĝia intereso per ĉiaj rimedoj ŝirmi la kapitalismon. Sed mi demandas: kial la socialdemokrataj partioj ŝirmas la kapitalismon? Mi estas simpla homo, do scias nur malmulte pri ekonomio. Sed mi estas certa pri tio, ke, se la fama "moratorio" (pagprokrasto) de lia dolara moŝto Huve (Hoover) kapablos ŝirmi la kapitalismon ankoraŭ dum 1. jaro, ĝi certe ne utilos al la laboristaro. Se ankaŭ la socialdemokrataj partioj samopinias kiel mi, kial ili do tiel entuziasmiĝis pri la moratorio? En mia lando la socialdemokrata gazeto "Het Volk" ("La Popolo") enpresigis alvokon de iu abonanto por instigi ĉiujn legantojn sendi simpati-esprimon al s-o Huve pri lia "mondsavonta" plano k la redakcio ne komentis tiun artikolon. Kaj hodiaŭ ĝi skribas: "La plano estas savita", ĉar Francio konsentis.

Jen, K-do, kion *mi* ne komprenas: kial la socialdemokrataj partioj tiel enamiĝis en la kapitalismo, ke ili per


Por relative tre modera sumo
vi povas akiri libron de daŭra valoro:

PLENA
VORTARO DE ESPERANTO

La unika lingva konsultilo por ĉiu esperantisto!

*536 paĝoj. Form. 14×20 cm.*
*Prezo: bindita 10 mk. g., broŝ. 9 mk.* (afrankite).

**SAT** *23, rue Boyer, Paris XX, aŭ Colmstr. 1, Leipzig O 27.*

ĉiaj rimedoj volas ŝirmi ĝin? Eble alia pli sperta K-do povos klarigi tion al mi.

*SAT-ano 14 942.*

---

Kio okazis, kiam la giganta privata banko "Kredit-instituto" en Aŭstrio alproksimiĝis al la bankroto? Ĉi tiu bankroto estus povinta kaŭzi la disfalon de la tutmonda kapitalismo, kion baldaŭ instruos al ni la evoluo. — Sed jen la faktoj: La 12-an de majo la ekruiniĝo de l' banko konatiĝis k la ĉeforgano de la aŭstria socialdemokrata partio skribis: "La bankroto de l' *Kredit-instituto,* banko de l' grandkapitalisto Rotŝild, alproksimigis la aŭstrian industrion al abismo. Al tiu bankentrepreno apartenas 75% el la aŭstriaj fabrikoj; per la bankroto ili estas endanĝerigitaj malfunkcii; tion ni devas eviti. La ŝtato apogu nepre la bankon!"

Por ebligi al la ŝtato, en tia grandega amplekso, finance subteni privatan bankon, necesis estigi novan t. n. "garanti"-leĝon, kiu tri tagojn post la bankroto estis transdonita al la parlamento. Kaj ĉiuj socialdem. deputitoj voĉdonis senescepte por la garantileĝo certiganta nemezureblajn sumojn al la en- k eksterlandaj kapitalistoj, kiuj per la senplana mastrumado malgajnis la monon. Kaj nun la laborula klaso ĉion devas pagi; el ĝi la ŝtato nun elpremas la monon per novaj k malnovaj plialtigitaj impostoj, favore al la malriĉaj grandkapitalistoj. Mi ĝustigas: neniu almozpetis aŭ helpopetis ĉe la socialdemokratoj: nek la ŝtato nek Rotŝild. La socialdem. partio nepetite de iu flanko, montris tuj sian libervolan preton por helpi al la kapitalismo. Mi petas la K-don F. S. raporti al la gelaboristoj sincere, ĉar malsincero malutilas la aferon.

*16 869.*

# PRI VIVREFORMO

Laŭdon meritas la kuraĝa juna K-dino T., kiu kun entuziasmo k riĉa scio paroladis en la Lajpciga SAT-rondo pli ol unu horon pri la temo "vivreformo". Bedaŭrinde estas nur, ke ne pli granda aŭskultantaro aŭdis ŝiajn parolojn, instruojn, instigojn k admonojn.

Unue ŝi parolis kontraŭ la alkoholkonsumo. Estas ja nedubeble, ke jam post la trinko de eĉ nur unu glaso da biero la homo ne plu estas tiom akre penskapabla, kiel antaŭe. Tion mi spertis sur mi mem, kiam antaŭ 25 jaroj mi unuafoje okupis postenon en sindikato k tial estis devigata tre atenti pri ĉiu en kunsido parolita vorto. Depost tiam mi ne plu trinkas alkoholon. Aliaj motivoj estas krome la volo, ne pliriĉigi la per alkoholkonsumo estiĝintan kapitalon, k doni ekzemplon, ke homo ne bezonas alkoholon, kion asertas la diversaj fiinteresuloj.

Tiuj samaj du lastaj motivoj instigis min antaŭ 8 jaroj ne plu fumadi. Mi konsideras ĝin kiel grandan malĝentilon, se fumantoj pretendas havi la rajton malbonigi en kunsidoj ktp. la aeron, kiun ja devas ankaŭ enspiri nefumantoj. Mi kredas, ke kelkiuj el la lastaj pli ofte k pli ĝoje vizitus kunvenojn, se la fumantoj kontentiĝus veneni la proprajn organojn k rezignus turmenti laŭplaĉe aliajn k malutili al ties sanstato k bonfarto. Sed grava estas ankaŭ por ni proletoj la financa profito, kiun ni gajnas per nekonsumo de alkoholo k nikotino. La koncernan monon oni povas uzi por kulturaj celoj ktp. Iuj povus ĉiujare entrepreni vojaĝon, ĉu solaj, ĉu kun la familianoj, se ili detenus sin de siaj ĝisnunaj kutimoj.

Rilate la vegetarismon mi opinias, ke miksita nutraĵo ne domaĝas. En pli fruaj jaroj mi instigis mian edzinon prezenti sur nia tablo nur vegetarajn manĝaĵojn. Sed tre baldaŭ ŝi protestis asertante, ke tia faro estas tro multekosta, se la manĝaĵoj devus havi bonguston. Aliflanke pli simpla preparado ne plaĉis al ni rilate la guston. Krome ni spertis dum la milittempo, ke nuraj plantnutraĵoj ne bone satigas k se ili estas konsumitaj pli grandkvante, tiam la korpo aliel sentas sin nebone influita. Sed pri fruktoj de arboj, mi asertas ankoraŭ hodiaŭ, ke la homo neniam tro multe povas manĝi da ili, ĉar la frukto ĉiam estas saniga por korpo k menso. Nuntempe, en aĝo de pli ol 50 jaroj, havante iom pli dikiĝintan ventron, mi evitas ofte viandmanĝaĵon.

La korp-aliiĝo instigis min depost 1½ jaroj ĉiumatene dum kelkaj minutoj fari gimnastikajn ekzercojn. Tio postulas, precipe je frua horo, ioman gradon da energio k volo. Nu, jam post 3 ĝis 4 genufleksoj la dormemo estas anstataŭita per agrabla sento, trafluanta la tutan korpon. Tiel membroj k artikoj restas en bona moveblo, k depost la nomita tempo mi ne plu suferas pro reŭmatismo.

Rilate al nudkulturo mi rekomendas lasi agi ĉiun laŭ sia bontrovo. Kvankam mi ĝin tute aprobas, tamen ĝin praktiki ĝis hodiaŭ mi ne riskis. Kompreneble, dum somero mi preskaŭ ĉiutage vizitas riverbanejon, kuŝante poste dum horoj, nur banvestite, sur herbejo. La modo estas tre ĉagrena ĉapitro. Ĉiun dandismon mi abomenas. Simplan, praktikan veston mi portas, sed plej volonte mi surmetas la migrulan veston speciale taŭgan por miaj dimanĉaj ekskursoj. Tiam la kolo ne plu estas enpakita en la trifoje malbenita malmola kolumo k libere mi spiras k moviĝas en freŝa arbaraero. Bedaŭrinde mia ofico ne permesas ĉiutagan forĵeton de la kolumo, ĉar ŝtatoficisto ĉiam devas esti vestita bonburĝe. Tiurilate mi ankaŭ devas submetiĝi al la modo.

Loĝeja kulturo! Mankas la financaj rimedoj por forigi la multornamitajn meblojn aĉetitajn antaŭ 26 jaroj k anstataŭigi ilin per nuntempaj pli higienaj k pli praktikaj mebloj. Tamen iagrade mi reformis la loĝejon. Ŝtofajn tapiŝojn mi anstataŭigis per linoleumaj, ĉar ili estas multe pli facile

---

## Ĉu la Gek-doj ŝatas maldecaĵojn?

(Rilatas la artikolon de K-dino 509 en n-o 349)

Tre mirigite mi legis vian skribaĉon, kara K-dino! Ĉu vi vere kredas, ke la plimulto estas kun vi? Nun ni antaŭ longa tempo jam rimarkis, kiel obstine burĝaĉe vi pensis. Inter ni laborantoj (k mi esperas, ke ankoraŭ laborantoj legas "S-ulo"-n) do estu klaro k ni ne kaŝu ion antaŭ ni. Jes, fakte la "maldeca" vorto "necesejo" povas fariĝi tre maldeca, se oni havas tian ejon kiel ni (enestas vermoj k skaraboj), sed entute ĝi ja estas tre "necesa". Aŭ ĉu vi ŝatas esti en pralando, kie oni ankoraŭ malhavas ĝin? Nu, mi ne povas imagi tion al mi tro sana. — Pri la citita artikolo de K-dino Klaps mi nur povas diri, ke mi ĝin trovis tre bona k salutas tion, ke ekzistas K-dinoj, kiuj estas sufiĉe kuraĝaj, por skribi ion, kio malplaĉas al la reakcio. Mi nur miras, ke vi ne ankaŭ citis la artikolon de K-dino Tajĥman pri nudkulturo. Eble la tiam de vi skribita sensencaĵo ankaŭ al vi sufiĉas. Kara K-dino 509! Mi vin imagas al mi kiel maljunulino, iomete eĉ kiel monaĥino kun mondpercepto kiel ĝin havis nia avino k ankaŭ kun sufiĉe da mono. Sed ni, ni estas junaj, tute senmonaj, sed esperas por nia infano pli bonan sociordon k pro tio ni ankaŭ estas sinceraj k ĉion nomas per la ĝusta nomo. Ni ne imitas la burĝojn k iliajn metodojn. Ankoraŭ estas tiel, ke la plej sinceraj homoj ankaŭ estas la plej bonaj.

*K-dino 1615.*

---

### Okaze de la Kongresa Semajno

**ne aperas n-o de "S-ulo", ĉar, kiel ĉiujare, redaktoro k administranto veturas al la Kongreso. La venonta n-o aperos post du semajnoj en amplekso de 12 paĝoj.**

purigeblaj k eble pli ol la unuaj ornamas la ĉambron. Sur la muroj pendas nur po unu granda bildo, montranta belan pejzaĝon, sed neniun fantaziaĵon pri elfoj, anĝeloj k. s. Ankaŭ je foto-bildserio pri la parencaro mi rezignis. La multaj metalaj, vitraj aŭ porcelanaj objektoj, iam "ornamintaj" la vertikovon (mezgrandan tolaĵoŝrankon), estas forigitaj k la edzino ŝparas per tio multe da superflua puriga laboro. Devis cedi en la dormĉambro la grandaj pezaj litoj kun malfacile transporteblaj matracoj al blankaj feraj facilmoveblaj litoj, kiuj jam per si mem efikas orname. Ankaŭ en la kuirejo reformis la edzino. Malaperis la etaĝero, sur kiu staris vicoj da skatoloj k potetoj, kies enhavo ĝenerale tute ne respondis al la surskribo sur la ujo k kiuj plej grandparte neniam estis uzitaj. Sed la plej bona volo al reformo trovas sian limon en la enhavo monuja.

Depost 16 jaroj mi loĝas en domo de loĝeja kooperativo k evitas per tio multe da ĉagreno k disputo, kiujn mi iam spertis ĉe privataj dommastroj.

Ĝenerale oni povas diri, ke la nuntempa vivreformo dependas altgrade de la eduko, kiun ĝuis la infanoj ĉe la gepatroj k en la ilin ĉirkaŭanta medio. Sed la gepatran influon ofte superas tiu de l' parencoj, amikoj, instruistoj aŭ aliaj personoj. Mi spertis tion ĉe miaj propraj tri infanoj, kiuj ofte ne iras la de mi deziratan vojon.

Ĉiu serioza, pensema k progresema plenkreskulo eduku sin mem ĉiutage k ĉie laŭ sia mondkoncepto, kiun li havigis al si dum la travivitaj jaroj. Li ekzamenu ĝisfunde ĉiun novan problemon k agu prijuĝinte ĝin laŭ la elektita starpunkto. Flanke de tio li havas la moralan devon influi en konvena, tolerema k lojala maniero, sen iu ajn teda altrudo aŭ aplombo, la homojn, kun kiuj li vivas.

Ĉio rilata al la vivreforma temo vere meritas esti flegata de progresemaj homoj, kiaj volas esti ĉiuj SAT-anoj. *Kvindekdujarulo (135).*

## POR NIA MEDITO

*Groŝon ŝtelis — ho, ŝtelisto! milojn ŝtelis — financisto. Ŝteletiston oni batas, ŝtelegiston oni ŝatas.*

*

*Eminenta ŝuldanto — malbona paganto.*

*

*Estu ĉapo laŭ la kapo.*

*

*Kiu bati deziras, trovas bastonon. Por ŝafon formanĝi, lupo trovos pretekston. Por hundon dronigi, oni nomas ĝin rabia. Muso la katon ĉiam ofendis.*

*

*Kulo nenion valoras, sed ĝia piko doloras.*

El Proverbaro Esperanta de L. L. Zamenhof.

# TRA ESPERANTIO

## ★ XI. Kongreso de SAT en Amsterdam (Nederl.)

2.–7. aŭgusto 1931.

### Lasta komuniko

La *nura akceptejo* estas la *kongresejo:* "DE BRAKKE GROND", NES 53/55, Amsterdam-Centrum. Ĉiu direktu sin tien, ĉar tie oni ricevas ĉiujn bezonaĵojn k informojn.

Rabaton ĉe fervojo aŭ tramo ni vane petadis. *O. K. K.*

### 5. listo de aliĝintoj

| | | | |
|---|---|---|---|
| 145 | Griggs, | Londono (Anglio), | nova |
| 146 | Bowden, M., | „ „ | nova |
| 147 | Bowden,* | „ „ | nova |
| 148 | Scott, A. H., | Watford „ | 10396 |
| 149 | Faulhaber, E.,* | Amsterdam (Ned.), | 13746 |
| 150 | Gesler, H., | „ „ | 17268 |
| 151 | Martin, J. M.,* | „ „ | 17144 |
| 152 | Martin, M. G.,* | „ „ | 17145 |
| 153 | Keable, G.,* | Londono (Anglio), | 11 995 |
| 154 | Bergit, L., | Beziers (Francio), | 8781 |
| 155 | Castel, L. M., | Toulouse „ | 13373 |
| 156 | Meister, H., | Merkstein (Germ.), | ? |
| 157 | Veen, A., | Amsterdam (Ned.), | 13606 |
| 158 | Veen, M.,* | „ „ | 17031 |
| 159 | ten Hagen, H., | „ „ | 16764 |
| 160 | Rengelink, A.,* | „ „ | ? |
| 161 | Murbio, M., | Bekkelagshögda (Norv.), | 102 |
| 162 | Limouzin, E.,* | Paris (Francio), | 509 |
| 163 | Cachon, H., | „ „ | 24 |
| 164 | Hocking, S., | Londono (Anglio), | 10641 |
| 165 | Hall, R., | Peterborough „ | 7145 |
| 166 | Mortiers, T., | Antverpen (Belgio), | 1739 |
| 167 | v. Es, A.,* | „ „ | 7440 |
| 168 | Svensson, | Stockholm (Svedio), | 14565 |
| 169 | Fox, J., | Praha (Ĉeĥoslov.), | 14217 |
| 170 | Hermanns, P., | Duisburg (Germ.), | 15446 |
| 171 | Zähler, L.,* | Dortmund „ | 17395 |
| 172 | Rieke, C.,* | „ „ | 17280 |
| 173 | Falkenherr, H., | „ „ | 10084 |
| 174 | Falkenherr,* | „ „ | 13563 |
| 175 | Sandmoller, K., | „ „ | 17349 |
| 176 | Hueck, H., | „ „ | 17393 |
| 177 | Fluder, A., | „ „ | 10746 |
| 178 | Krasner, A., | Dortmund (Germ.) | 15638 |
| 179 | Keuning, D., | „ „ | 10742 |
| 180 | Schlüter, F., | „ „ | 15639 |
| 181 | Rahlf, L.,* | „ „ | 14358 |
| 182 | Gerboth, F., | „ „ | 7729 |
| 183 | v. d. Heid, B.,* | „ „ | 13562 |
| 184 | v. d. Heid, A., | „ „ | 61 |
| 185 | Vielhauer, W., | Heilbronn „ | 16626 |
| 186 | Pförtner, R., | Sebnitz „ | 6707 |
| 187 | Wenzel, A., | „ „ | 1223 |
| 188 | Goudlits, H.,* | Wurzen „ | ? |
| 189 | Liegl, | Pasing, | 7960 |
| 190 | Schalmey, P., | Hannover (Germ.), | 7367 |
| 191 | Mormann, K., | „ „ | 7947 |
| 192 | Mitchell, J., | Londono (Anglio), | 16792 |
| 193 | Brown, S., | „ „ | 7327 |
| 194 | Shipman, A.,* | Birkenhead „ | 9044 |
| 195 | Schweighart, F., | Salzburg (Aŭstrio), | 4562 |
| 196 | Jurriaans, R.,* | Amsterdam (Ned.), | nova |
| 197 | Roelofs, W. P., | Soest „ | nova |
| 198 | Waldmann, A., | Bremen (Germ.), | 11761 |
| 199 | Brauckmann, | de Zilk (Ned.), | 12707 |
| 200 | Trotsenburg,* | „ „ | 12720 |
| 201 | Bird, J., | Sheffield (Anglio), | 5847 |
| 202 | gasto (ne-SAT-ano) | | |
| 203 | Lugo, A., | Sheffield (Anglio), | 16683 |
| 204 | Husmann, E.,* | Amsterdam (Ned.) | 16978 |
| 205 | Wolf, E.,* | Heveadorp „ | 17312 |
| 206 | Polak, E., | Amsterdam „ | 16914 |
| 207 | Launay, R., | S. P. des Corps (Fr.), | 8251 |
| 208 | Valentiner, J., | Hamburg (Germ.), | 4041 |
| 209 | Siesem, H., | Amsterdam (Ned.), | 16980 |
| 210 | Lakerveld, N., | „ „ | 13604 |
| 211 | Tillard, F. A., | „ „ | 13595 |
| 212 | gasto (ne-SAT-ano) | | |
| 213 | Sierag, | Amsterdam (Ned.), | 16979 |
| 214 | Matiasen, J., | „ „ | 17225 |
| 215/16 | gastoj (ne-SAT-anoj) | | |
| 217 | Mason, B.,* | Londono (Anglio), | 16420 |
| 218 | Mason, W., | „ „ | 16419 |
| 219 | Hooghuis, H., | Groningen (Ned.), | 17253 |
| 220 | de Wart, G.,* | Hilversum „ | 14507 |
| 221 | Verheugd, G., | Amsterdam „ | 17014 |
| 222/29 | gastoj (ne-SAT-anoj) | | |
| 230 | Blok, | Amsterdam (Ned.), | ? |
| 231 | Schoonenberg, | den. Helder „ | ? |
| 232 | Verschoof, | Hoek v. Holland | nova |
| 233/35 | gastoj (ne-SAT-anoj) | | |
| 236 | de Lange, J., | Amsterdam (Ned.), | 17094 |
| 237/39 | gastoj (ne-SAT-anoj) | | |
| 240 | Bersma, J., | Amsterdam (Ned.), | ? |
| 241 | Mulder, D., | „ „ | ? |
| 242 | Liedermooij, | Amsterdam (Ned.) | 16458 |
| 243 | Noël, E., | le Havre (Francio), | 13395 |
| 244 | Hamksworth, | Liverpool (Anglio), | 7688 |
| 245 | Dülken, W., | Köln (Germ.), | ? |
| 246/47 | gastoj (ne-SAT-anoj) | | |
| 248 | de Vos, M. C.,* | Amsterdam (Ned.), | 16995 |
| 249 | Exman, C. F., | „ „ | 16982 |
| 250 | v. d. Linden, A., | „ „ | 13879 |
| 251 | Essenberg, M., | „ „ | 17276 |
| 252/54 | gastoj (ne-SAT-anoj) | | |
| 255 | Groenestein, A., | Enschede „ | 10451 |
| 256 | Kroonder, A., | Amsterdam „ | ? |
| 257 | de haan, E., | „ „ | 16981 |
| 258/63 | gastoj (ne-SAT-anoj) | | |
| 264 | Paverd, J.,* | Amsterdam (Ned.), | 16193 |
| 265 | Groeneweg, | „ „ | 17388 |
| 266 | Rademaker,* | „ „ | 17098 |
| 267 | Carstens, H., | Kiel (Germanio), | ? |
| 268 | Grune, R., | „ „ | ? |
| 269 | Reul, A., | Würselen „ | 7233 |
| 270 | Bruckenberger, | Bad Ischl (Aŭstr.), | 9877 |
| 271 | Avid, L. G., | Villejuif (Francio), | 5479 |
| 272 | Kùlhem, W., | Köln (Germanio), | ? |
| 273 | Crispin, J., | Blackburn (Anglio), | 10510 |
| 274/75 | gastoj (ne-SAT-anoj) | | |
| 276 | Ramacher, J., | Düren (Germ.), | 7850 |
| 277 | Rahlf, M., | Dortmund „ | 17409 |
| 278 | Appel, H., | „ „ | ? |
| 279 | Becker, W., | Düsseldorf „ | 17392 |
| 280 | Puff, L., | Frankfurt a.M. „ | 320 |
| 281 | Steinbach, F., | Leipzig „ | 10005 |
| 282 | Liegeois, E., | Orchies (Francio), | 12783 |

* = K-dino.

### Radio-disaŭdigoj esperantaj en Ĥarkovo

De l' 18. julio komenciĝis nova ciklo de esp-lingvaj disaŭdigoj ĉe la Ĥarkova radio-sendejo. La disaŭdigoj okazas ĉiusabate (do la 1. 8., 8. 8., 15. 8. ktp.). Horo: 21 h. 45 laŭ MET. Ondlongo: 938 metroj. Por havi la eblon aranĝi laŭeble plej bone niajn disaŭdigojn, ni petas ĉiujn K-dojn sciigi al ni (laŭ adr.: Esperanto-Disaŭdigo, Palac Praci 60, *Ĥarkov,* USSR) jenon: 1. ĉu taŭgas tempo de l' disaŭdigo (aŭ kiu estas preferinda)? Ĉu

necesas plioftigi la disaŭdigojn? 2. Kiuj temoj vin speciale interesas? Kion vi prefere aŭskultos el la programo? Ĉu ĉi tiu konsistu ĉiufoje el nur unu raporto aŭ el kelkaj malpli grandaj? 3. Ĉu samtempe disaŭdigi revol. muzikaĵojn? Kiajn? 4. Ĉu vi dez. ricevi la tekstojn de l' disaŭdigoj k eluzi ilin por la nacilingva gazetaro?

*Radio-Ĥarkovo.*

### ĈE LA NEŬTRALULOJ

De 23-a ĝis 25-a de majo okazis en Hamburgo la 20-a Germana Esp.-Kongreso kun oficiala akcepto de l' estraro k konsilantaro ĉe la urbestro. Samtempe okazis la jarkunveno de l' esp.-unuiĝo de germanaj instruistoj k pacista kunsido. La malferman kunsidon ĉeestis ĉ. 400 personoj, esp-istoj k gastoj. Laŭ la admin. raporto GEA havas nuntempe 128 grupojn kun 2197 pagantaj membroj.

*

Por esperanta teatro-arto en Londono vigliĝas entuziasmuloj. Okazis prezentoj de du originalaj komedioj dum majo. La ludantoj estas organizitaj en Londona Drama Rondo.

*

La kurso de Andreo Ĉe, okazanta de 20-a ĝis 31-a de julio en Krakovo (antaŭ la en tiu urbo lokon havanta 23-a universala kongreso de esperanto) estas oficialigita de la Krakova urbestraro.

*

La Lubljana meteorologia instituto eldonis originale en esperanto sciencan broŝuron pri la oscilado de la riverniveloj en sudorientaj Alpoj, kiu estas dissendata al sciencaj rondoj tra la tuta mondo.

*

La dua verko de Remark (Remarque), la konata milit-aŭtoro, aperos sub titolo "La vojo returne" post kelkaj semajnoj en esperanta traduko.

*

Oni akceptis en la 22-a jarkunveno de la Internacia Rotario (Rotario estas grupiĝo por reciproka helpo) en Vieno rezolucion favoran al esp-o k starigis esplor-komisionon, kiu okupos sin pri la ebloj enkonduki esp-on en lernejoj ktp. Vienaj esp-istoj aranĝis okaze de tiu kongreso specialan kunvenon vizititan de pli ol 120 personoj.

*

Franca esp-ista kongreso okazis de 23. ĝis 25. majo en Diĵono. Ĝi estis malfermata per propaganda parolado de profesoro ĉe Grenobla universitato, subdirektoro de elektroteknika instituto samurba, s-o Dejo (Dejeau). Akcepto ĉe la urbestro; la ministro de l' publika instruado estis reprezentita. Raportoj pri la diversaj fakoj de l' organizo. Nombro de kongresaliĝintoj 163, havantaj mandatojn por ĉ. 1700 membroj.

*

La 26-a Skota Esp. Kongreso okazis de 15.—18. majo en Ardenkonel; ĝin partoprenis ĉ. 150 personoj, inter kiuj estis por la unua fojo oficialaj delegitoj de diversaj lokaj Esdukaj Institutoj (instruist-grupoj).

*

La estona registaro aranĝas k subvencias oficialan Ĉe-kurson 11-tagan en Tartu por la estona, finlanda, latva k litova instruistaro, kiun gvidos Ĉe mem (dum unua duono de julio).

**Somera surprizo**
fariĝis por la esperantistaro la verkoj de la fama hungara verkisto
**Kolomano Kalocsay**
tradukinto de **Tragedio de l' Homo**
ĉefredaktoro de **Literatura Mondo**
Fine de julio samtempe aperos la tri verkoj:

**Streĉita Kordo**
Originalaj poemoj de la verkisto. Vi trovos en ĝi la plej famajn poemojn: "La patrineco", "Pala procesio" k. a. 192-paĝa. Bindita P. 6.50, broŝ. P. 4.50

**Rimportreto**
55 portretoj de esperanto-steloj el ĉiuj tendencoj de la movado, kun foto de la "steloj". 128-paĝa.
Bindita P. 5.—, broŝ. P. 3.—

**Lingvo, Stilo, Formo**
Studoj pri esperanto. La plej abundaj klarigoj pri la esperanta versfarado, rimaro, internacia stilo, pri la evoluo de esperanto verkita de la plej fama nuntempa stilisto. 160-paĝa.
Bindita P. 5.40, broŝ. P. 3.40

Al la prezoj aldonu 10% por sendkostoj. Kiuj mendas ĉiujn tri verkojn kune ĝis la 15-a de julio (ekstereŭropanoj ĝis 1. aŭgusto) ricevas
la broŝuritan eldonon anstataŭ P. 12.— por P. 10.— (afrankite)
la binditan eldonon anstataŭ P. 18.60 por P. 15.40 (afrankite)
Por koni pli detale, postulu detalan prospekton
Rapidu mendi ĉe la eldonejo
**Literatura Mondo**
(Bleier Vilmos) Hungario, Budapest IX. Boráros tér 6. IV. 11.
(Hungara poŝtŝparkasa konto Budapest, 25, 168) aŭ ĉe *Administracio de SAT, Leipzig O 27.*

## RECENZEJO

Duope ricevitajn verkojn ni recenzas, unuope ricevitajn ni nur mencias.

**Dudekdua Universala Kongreso de Esperanto** (Oxford, 2—9. aŭg. 1930). Oficiala Dokumentaro Esperantista. Eld. Internacia Centra Komitato de la Esp-Movado, 1, Tour de-l'Ile, *Genève* (Svisio). 140 pĝ. Form. 14×22 cm. Prezo nenotita.

## MEMORNOTO

**Represis el "S-ulo":**

*Tagblatt*, Linz, 27. 6., Rezignu vian potencon (343).

**Priesper. artik. k notojn enhavis:**

*The Labour Woman*, Londono, jul. (rubr.); *Signalen*, Stokh., 2. 7., 9. 7. (ankaŭ pri SAT-kongr.); *Le Socialiste de la banlieue Sud*, julio; *Aichfelder Ztg.*, Knittelfd., 13. 6.

Jubilea n-o de "De Wapens Neder" (monata gazeto de internacia antimilitisma unuiĝo en Nederl.) de julio 1931 presigas fruntpaĝe kliŝojn de la gazetoj, kiuj uzas materialon el la gazetservo de IAMB, i. a. "S-ulo". La jubilea kongreso de IAMB okazis 25. ĝis 26. julio en Hago (kun paroladoj de diverslandaj sindikatistaj k anarkistaj gvidantoj).

## NIA POŜTO

*M. Leber.* — Ni presigos vian artikolon en "L. L.".

*7780.* — Ni ne uzos vian tradukon, ĉar ni raportis pri la afero jam dufoje en "S-ulo" (La Klasbatalo tra la Mondo).

*16 896.* — Mankas loko por enmeti vian artikolon. *Red.*

## KORESPONDADO

Unu enpreso, simpla trilinia anonceto kostas 0,80 mk. g., ĉiu plia linio 0,50 mk. g. — Grandaj anoncoj kun kadro: po kv. cm. kostas 0,20 mk. g.

**AŬSTRIO**

—La plej granda Aŭstriulo interŝ. L, PK, PI, kĉl. Nepre resp. Mi estas komercisto. Adr.: Fred Sibitz (Göc), *Bruck an der Mur.*

K-do Antono Latera, Kuefsteing. 48/24, *Wien XIII.*, kĉl, PM, PK, L, PI.

**FRANCIO**

6 Gek-doj dez. korespondi kun ĉ. l., escepte kun Germanio. Skribi al: Moreau Roger, Fg. Pont-Levis, *St. Junien* (Haute-Vienne).

**GERMANIO**

—LEA-grupo koresp. kĉl, pri ĉ. temoj, L, PK, PI, gaz. il., esp-aĵoj. Resp. garantiata. Adr.: Jos. Chraust (13 676), Bebelring 31/II, *Mainz/Rh.*

**SVISIO**

K-dino Herta Tauber (juna esp-istino), Casa Balossi Tessin, *Orselina-Locarno*, kun ekstereŭropaj Gek-doj. Resp. garantiata.

**Esperantista Libertempejo**
13 km. de Nice. Suno tutan jaron. Plena pensiono en domo de 5½ mk. g. Ekskursoj, nekare. Alpoj, Monte Carlo, Italio ktp. Skribu: al: K-do Yelland, *Aspremont apud Nice* (Francio).

**ISK**
**Esperantlingva revuo** eldonita de Internacio de Socialista Kunbatalo
**Reduktita abonprezo!**
Pojare (4 numeroj) nur 1.— mk. germ. aŭ 4 internaciajn respondkuponojn
Petu provekzempleron senprokraste de
**"ISK"-Expedition,** Nikolausbergerweg 67, Göttingen (Germ.)

## ENHAVO

| | pago |
|---|---|
| Grava fako de militindustrio: La aviadil-fabrikoj | 345—46 |
| Rakontas SAT-anoj, kiuj travivis la militon | 346—47 |
| Militon al milit'! | 347 |
| La oratoro | 348 |
| Civilizo k barbareco | 348 |
| La klasbatalo tra la mondo | 348—49 |
| Mi volas scii | 349—50 |
| Ĉu la Gek-doj ŝatas maldecaĵojn? | 350 |
| Pri vivreformo | 350—51 |
| Por nia medito | 351 |
| Tra Esperantio | 351—52 |
| Korespondado, Anoncoj | 352 |

Presejo: Neudrag, Leipzig (Germanio)